

6

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

JUNIO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * Antaŭ la kongreso	1
* * XXXV kongreso de BEA	2
Argento. Burgas — nia kongresurbo	4
M. Conkovski. Jarkunveno de Bulgara Esperantista Kooperativo .	5
German Titov pri Esperanto	6
V. Artes. Sanktaj aferoj de paradizo kaj infero (versaĵo)	6
I. Batakliev. Heroa impeto (versaĵo)	7
At. D. Atanasov. Al la kursejo (oka leciono de la kurso por perfektiĝo)	8
* * Gajnintoj en la organiza konkurado 1961—1962	10
S. Simeonov. Bulgara esperantista junularo antaŭ la 35-a kongreso de BEA	11
ORGANIZA VIVO	11
TRA LA GAZETARO	13
TRA LA MONDO	14
* * Parolo de la redakcio	15
RIDO SANIGAS	16

*Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifoj: 0,15 levoj por cm²; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 .v.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.	NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.
ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova	RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep- tembrie 65, București 5
KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.	SOVETUNIO: Jvan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162
	SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



ANTAŬ LA KONGRESO

Restis ne multaj tagoj ĝis nia XXXV landa kongreso. Ĝi ne nur bilancos nian agadon post la lasta kongreso en Târnovo kaj donos la perspektivon kaj direktivon por la plua disvolviĝo de la enlanda movado. Ĉi estos ne nur ĝoja festo de la bulgaraj esperantistoj, kiuj sin gratulos pri la atingitaj sukcesoj. Ĝi ne nur faros kroman propagandon al nia ideo pri la disvastigo de la internacia lingvo kaj ties apliko en la interpopolaj rilatoj. Ĝi estos ankaŭ forta organizilo de nia movado, ĝi kontribuos al organiza plifortigo de niaj vicoj, al plua kresko de la asocia disciplino, al plialtigo de nia socia aŭtoritato. Ĉu la kongreso estos plensukcesa en ĉiuj tiuj ĝiaj funkcioj dependas de nia antaŭkongresa laboro kaj de nia dumkongresa konduto.

Niaj landaj Esperanto-kongresoj estiĝis dum la lastaj jaroj amasa manifestiĝo de la vigleco kaj unueco de nia movado, de ĝia forto kaj konstanta kresko. Ĉe tia granda nombro de kongresanoj estas necesa severa disciplino por ne fuŝi la bonan aferon.

Jam okazis la antaŭkongresaj kunvenoj de la societoj dum kiuj estis elektitaj la delegitoj. Ĝis la fino de junio la societaj estraroj devos sendi al CK de BEA la liston de la delegitoj laŭ la presitaj formularoj. Ĝis la 5-a de julio ĉiuj societoj ricevos la delegitajn kartojn. La kongreskartoj estas jam ricevitaj de ĉiuj aliĝintaj kongresanoj. Post la 1-a de julio LKK akceptos neniajn aliĝojn. Estas sciate, ke la loĝeja problemo en Burgas dum la somero estas tre malfacila, jen pro kio ni estu disciplinitaj kaj ne malhelpu la laboron de LKK per insisto pri novaj aliĝoj.

Por la disciplino de la kongresanoj respondecos la grupestroj de la societoj. Estus bone, se la estraroj de antaŭe sciigos al LKK ties nomojn. La kongresanoj rilatos al LKK pri diversaj demandoj nur pere de siaj grupestroj. Tio estas necesa por la bona ordo.

Do, ĉiuj kongresaj dokumentoj estas ricevitaj de la societo. Ĉiu kongresanto serĉu siajn dokumentojn ĉe la estraro. La estraroj ankoraŭfoje pri-studu ĉiujn cirkulerojn kaj artikolojn pri la kongreso kaj precipe ili pri-atentu la diversajn limdatojn. Ili kontrolu, ĉu ĉio estas plenumita. Oni atentu, kio estas sendenda al LKK kaj kio al CK de BEA.

Antaŭ la ekveturo devas okazi kunvenoj de la kongresantoj. Tie la societaj estraroj kaj la grupestroj instrukcios la grupanojn pri la ordo dum la kongreso, pri la disciplino dum la veturado kaj dum la kongreso, pri la sinteno de ĉiu esperantisto. Oni prizorgu la ornamon de la vagonoj kaj aŭtobusoj per Esperanto-flagoj, oni ellernu esperantajn kantojn (multaj kantoj estas presitaj en „BE“).

(daŭrigo sur p. 2)

LKK AGAS



La solena malfermo de la kongreso okazos en la Somera Teatro. La interkonan vesperon la kongresanoj pasigos en la vastaj kaj luksaj salonegoj kaj terasoj de restoracio „Primorec“. Ludos unuaklasa ĝazo. Surpriza programo. La kongreso estos filmigata. Post la malfermo de la kongreso okazos en la Somera Teatro granda kunveno de la paco, en kiu parolos la eksterlandaj gastoj. La intereso en eksterlando al la kongreso en Burgas estas tre granda.

Fabriko „Hemus“ produktos okaze de la kongreso kraĵojn kun surskribo „Esperanto“.

ALIĜINTOJ

Ĝis la 15-a de majo aliĝis al la kongreso jenaj societoj: Ruse („Ponto de l'Amikeco“) — 10, Ruse („Liberio“) — 24, Kubrat — 12, Sliven — 20, Peŝtera — 12, Dimitrovgrad — 52, Sofio („Heroldo“) — 24, Sofio („M. Gorkij“) — 75, Sofio („Aŭtotransporto“) — 17, Sofio („Printempo“) — 14, Drjanovo — 4, Razgrad — 9, Trojan — 11, Gabrovo — 10, Plovdiv — 57, Nova Zagora — 3, Kazanlâk — 30, Varna — 22, Vraca — 36, Târnovo — 11, Kjustendil — 19, Popovo — 11, Petriĉ — 13, Borovo — 7, Stara Zagora — 19, Sevlievo — 15, Haskovo — 6, Karlovo — 15, Stanke Dimitrov — 28, Pazargik —

24, Kolekta Grupo — 18; entute 637 aliĝintoj.

Jam la kongreskotizo estas 1,5 lv. Ni rememorigas, ke la aliĝiloj devas esti konfirmataj de la societaj estraroj. Sen tia konfirmo la aliĝiloj estos resendataj. La lasta limdato por aliĝo estas la 1-a de julio. Neniaj esceptoj estos farataj.

LKK jam dissendis la kongreskartojn kaj la certigilojn por veturado sur la fervojoj. La kongreskartoj estos necesaj ĉe la veturado kun rabato, por eniro en la kongresejon, por partopreno en la interkona vespero, la ekskursoj kaj en ĉiuj kongresaj aranĝoj. Sen kongresa karto neniu rajtos ricevi loĝejon. La kongreskartoj estas personaj, kaj neniu rajtas transdoni sian karton al aliu. La certigiloj estas necesaj, krom por veturado sur la fervojo kun rabato, ankaŭ por forpermeso. Ĉiu kongresano, laŭ artikolo 65 de la Kodo de la Laboro, havos rajton, je tritaga pagita forpermeso (ekster la regula jara liber-tempo) plus la tempo de la veturado.

La ĝojaj kongrestagoj alproksimiĝas. Ni plifortigu la praktikadon de la lingvo. La partoprenontoj devas jam kelkfoje semajne kunveni por interparoli en Esperanto, por perfektigi. Ĉie sur la Burgasaj stratoj aŭdiĝu belsona, korekta Esperanto-parolado. Ni ne forgesu, ke la formo, la belsoneco, la flua elparolado estas unu el la bonaj propagandantoj de nia lingvo.

Ĝis revido en Burgas!

LA ORDO DUM LA KONGRESO

La grupo de ĉiu societo devas havi respondeculon (grupestron). LKK rilatas nur kun la grupestroj. Ili prezentas en la akceptejo la kongreskartojn de ĉiuj grupanoj, pagas la luon kaj ricevas la enloĝigan bileton, per kiu ĉiu kongresano rajtas ricevi la difinitan loĝejon. Se iu kongresano havas iajn demandojn aŭ plendojn, li direktas ilin per la grupestro.

Ĉiu kongresano devas manĝi en la difinita por lia grupo restoracio kontraŭ prezento de la kongreskarto.

Lunde (la 16-an de julio) posttagmeze komenciĝas la konfirmado de LKK sur la certigiloj pri la efektiva partopreno de la kongreso. La certigiloj validos por iro al la Kongreso de la 12-a ĝis la 14-a de julio, kaj por reveno — de la 16-a ĝis la 19-a. La samaj post la reveno estos prezentataj en la entrepreno kaj la oficejoj por pravigo de la forpermeso.

EKSKURSOJ

Estos aranĝitaj du unutagaj ekskursoj: 1) al la pitoreska rivero „Ropotamo“ (Reĝa Rivero) proksime al la somerrestadejo Kiten, 2) al la ĉarma banloko „Suna Bordo“.

La biletoj por ambaŭ ekskursoj estos vendataj je la 14-a kaj la 15-a de julio en la kongresurbo ĝis ties elĉerpigo.

KURSO POR ESPERANTO-INSTRUANTOJ

Ekde la 30-a de junio ĝis la 13-a de julio, t. e. du semajnojn antaŭ la kongreso estos aranĝita de CK de BEA en Burgas dua tutlanda kurso por Esperanto-instruantoj. En la kurso oni instruos la metodikon de instruado kaj iujn organizajn problemojn de la Esperanto-movado. En la kurso povos partopreni nur geesperantistoj bonege regantaj la lingvon. Ĉar la nombro estas limigita, kursanojn prezentos la socie-

taj estraroj. El unu societo ne povas partopreni la kurson pli ol unu persono.

La kurstakso estas 5 levoj. Estos akceptataj kandidatoj ĝis la plenigo de la necesa nombro.

Post la kurso la gekursanoj povas sin prezenti al ekzameno, laŭ la kondiĉoj de la ekzamena regularo publikigita en n-ro 5 de „BE“. Ili devas sendi petskribon al CK en la difinita limtempo kaj la ekzamenkotizon.

LA DELEGITOJ

Estas jam elektitaj inter la plej bonaj, agemaj kaj aŭtoritataj esperantistoj. Ĝis la fino de junio la estraroj devas sendi al CK de BEA informojn pri la elektitaj delegitoj laŭ la sendita al ĉiuj societoj modelilo. Tuj post la ricevo de tiuj informoj CK de BEA sendos al la societoj la delegitajn kartojn, per kiuj la delegitoj rajtos voĉdoni. Dum la labor-kunsidoj por la delegitoj estos rezervataj la unuaj 20 seĝvicoj en la salono. La kunsidoj komenciĝos ĝuste en la difinita tempo kaj malfruigoj ne estos allowataj en la kunsidoj por ne malhelpi la laboron.

Ĉi-sube ni publikigas la nombron de la delegitoj por ĉiu societo. Inter krampoj la ciferoj montras la nombron de la regulaj societaj membroj, kies kotizo estas pagita al CK de BEA ĝis la 15-a de majo. Ni memorigas, ke laŭ cirkuleroj 9 kaj 10, la nombro de la delegitoj, kiujn rajtas elekti ĉiu societo estas kalkulata surbaze de la nombro de le societaj membroj, kies kotizo estas pagita al la asocio ĝis la 15-a de majo. Kotizo pagita post tiu ĉi dato ne estos konsiderata.

Asenovgrad — 6 (60), Batak — 3 (28), Beglej — 1 (6), Blagoevgrad — 3 (25), Bogdan — 1 (9), Borovo — 1 (7), Dimitrovgrad „Flamo“ — 9 (90), Pernik — 4 (40), Gabrovo — 4 (35), Harmanli — 1 (27 nur por la unua

BURGAS—NIA KONGRESURBO

Pitoreska estas nia bordo de la Nigra Maro. Ĝin vizitas ĉiujare multaj eksterlandanoj el la kvin kontinentoj kaj restas tiel kontentaj, ke kun ĉagreno profunde en la animo ili disiĝas kun nia belega lando.

Pitoreska estas ankaŭ nia fama urbo Burgas kiel kultura centro kaj somerrestadejo — haveno de Nigra Maro, kien ĉiutage alvenas kaj forveturas diversnaciaj vaporsipoj.

Ĉiutage ĝi ŝanĝas sian eksteran aspekton — plibeligas kaj komencas konkuradi al multaj fremdlandaj havenurboj.

Jen en tiu ĉi belega urbo okazos la 35-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj. Ĝin viziti estas invitataj ne nur la bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ gastoj el aliaj landoj.

La Kongreskomitato estas sur sia posteno. La urba estraro donas sian

valoran helpon. Lo-Ko-Ko ofte kunsidas kaj la granda laboro estas distribuata inter ĉiuj lokokanoj. La sekretario Argir Andonov ĉiutage okupas sin pri demandoj ligitaj kun la kongreso — kelkfoje ĉiutage li iras al la poŝtejo, ricevas la alvenintajn leterojn, ekspedis jam pli ol 2000 aligilojn, serĉas diversajn ejojn — por kunsidoj kaj kunvenoj, por nutrado, por dormado k. a. Nia fervora instruistino Jeljazka Stanimirova honore al la kongreso gvidas specialan kurson laŭ la rekta metodo, kaj la gekursanoj kun granda intereso vizitas ĝin.

Krom la esperantistoj, ankaŭ la civitanoj de Burgas kun granda senpacienco atendas la solenajn tagojn (14—16. VII. 1962) — la tagojn de nia 35-a Kongreso.

Ĉiuj sur sia posteno!

Argento

trimonato), Haskovo — 5 (50), Jambol — 19 (186), Kazanlâk — 13 (134), Kjustendil — 5 (45), Kneĵa — 2 (16), Kolarovgrad — 7 (66), Kubrat — 3 (33), Karlovo — 5 (47), Ljubimec — 2 (20), Loveĉ — 3 (30), Mezdra — 4 (35), Miĥajlovgrad — 6 (55), Nova Zagora — 2 (15), Orĵahovo — 3 (31), Pârvomaj — 2 (21), Pavlikeni — 1 (11), Pazarĝik — 7 (72), Peŝtera — 2 (15), Pleven — 7 (67), Plovdiv — 28 (282), Karnobat — 1 (12), Polski Trâmbeŝ — 3 (30), Popovo — 2 (20), Ruse „Libero“ — 9 (87), Ruse „Ponto de l'Amikeco“ — 5 (53), Razgrad — 3 (29), Sevlievo — 6 (55), Sliven — 2 (24), Sofio „Aŭtotransporto“ — 2 (18), Sofio „Heroldo“ — 6 (56), Sofio „Printempo“ — 5 (53), Sofio „Vela Peeva“ — 6 (60), Stanke Dimitrov — 8 (81), Stara Zagora — 18 (181), Svilengrad — 4 (36), Ŝtrâklevo — 2 (15), Târnovo — 5 (52), Tolbuhin — 6 (55), Trjajna — 1 (13), Trojanovo 1 (7), Varna — 20 (200), Va-

zovgrad — 1 (6), Velingrad — 3 (30), Vraca — 14 (135), Zimnica — 2 (15), Kolekta Grupo — 5 (17), CK-anoj — 43, KK-anoj — 5. Entute delegotoj — 347.

LA EKZAMENOJ

Okazos laŭ la programo kaj la regulo de la ekzamenoj. Laŭ la lasta la ekzamenoj devas sendi al CK de BEA ĝis la 25-a de junio petskribon kaj ekzamenkotizon (por ekzameno „L“ — 2 levoj, por ekzameno „I“ — 3 levoj). Ne pli malfrue ol la 9-an de julio CK de BEA devas respondi al la petintoj, ĉu ili estas allasataj aŭ ne al ekzameno kaj sciigi ilin pri la ĝusta horo kaj loko de la skribaj ekzamenoj. La kandidatoj por ekzameno „I“ devas prezenti kune kun la petskribo ankaŭ diplomon pri „Sufpera kono de Esperanto“.

JARKUNVENO DE BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

La 18-an de marto 1962, Bulgara Esperantista Kooperativo en Sofio kunvokis sian jarkunvenon por bilancraporti antaŭ siaj membroj. Por prezidanto de la kunveno estis unuanime elektita k-do C. Murgin — prezidanto de sofia Esp.-societo „M. Gorkij“.

La bilancraporton legis la vicprezidanto de la kooperativo k-do R. Pironkov kaj tiu de la kontrola komisiono — k-do L. Kozachev. Oni raportis, ke spite la grandajn malfacilaĵojn pro manko de necesaj deficitaj varoj kaj malgraŭ la likvido de iuj el la plej bonaj magazenoj, lige kun la rekonstruo de nia ĉefurbo, nia kooperativo havas puran gajnon de 39 416 malnovaj levoj. Tio estas tre kuraĝiga fakto.

La ĉeestantoj notis kun granda kontento la establitajn bonajn rilatojn de unueco kaj konkordo inter CK de BEA kaj la estraro de la kooperativo. Oni menciis la valoran helpon fare de la asocio por kolekto de tendumantoj kaj aranĝo de Esperanto-kursoj en Drujevo.

En sia parolo antaŭ la kunveno k-do A. Grigorov interalie diris: „Por la obstina laboro kaj por la atingitaj sukcesoj la estraro de la kooperativo meritas admiron. Kiel esperantisto mi ne povas esti indifera kaj ne esprimi mian ĝojon, pro la fakto, ke en Sofio ekzistas magazenoj kun esperantaj firmaoj, kien eniras la esperantistoj el la tuta lando kaj gastoj el eksterlando. Tamen mi ne povas ne kritiki pro la nesufiĉa propagando kaj disvendado de niaj libroj. Krome, ne ĉiuj librovendistoj scipovas Esperanton. Ili devas ellerni almenaŭ la minimumon, necesan por renkonti fremdlandanojn kaj proponi al ili almenaŭ la varojn en sia magazeno.“

St. Terzijski el Drujevo informis, ke li estas ricevinta ĉirkaŭ 30 leterojn de tendumintaj dum la somero en Drujevo geesperantistoj, kiuj esprimis sian kontentecon. Li apelaciis al ĉiuj viziti la tendaron en Drujevo kaj planti almenaŭ po unu arbeton, por ke la tendaro transformiĝu en florantan ĝardenon.

La kunveno elektis novan estraron de la kooperativo, kiu konstruiĝis jene: prezidanto Ev. Cifudov, vicprezidantoj — R. Pironkov kaj St. Minkov, sekretario — M. Conkovski kaj membroj — Iv. Kovačev, L. Marikin, G. Belev, St. Moraresku kaj D. Kalčev. Ĉiuj membroj, escepte de la lasta estas malnovaj estraranoj.

Minko Conkovski



Unuamaja manifestacio en Jambol

LETERO DE LA KOSMONAŬTO

Multaj esperantistoj gratulis la glorajn sovetajn kosmonaŭtojn pro ilia heroaĵo. Tie ĉi ni prezentas faksimilon de letero-respondo, skribita propramane de la kosmonaŭto German Titov. Ĝi tekstas jene:

„Mi ne scias la lingvon Esperanto, sed se ĝi servas al la paco kaj la amikeco inter la popoloj, tio signifas, ke ĝi estas bona kaj necesa lingvo“.

German Titov

*Ĝi ne estas Esperanto
Esperanto, sed ĝi servas al
amikeco inter homojn kaj
popolojn, do ĝi estas bona
lingvo, ĉar ĝi estas neceso
por paco kaj amikeco inter
popolojn.*

Titov



SANKTAJ AFEROJ DE PARADIZO KAJ INFERO

Dediĉita al German Titov

Ŝanceliĝas dia trono,
paradizo en mizer':
tra la kosma regiono
ree flugas hom' de Ter'.
„Kien fuĝu ni, kaj kie
savon trovi de l' minac'?
Homoj nin atingos ĉie,
estas tro malvasta spac'!“

Jen depeŝo el infero
tuj al di': „Saluton, frat'!
Por subteni en afero
mi proponas kun kompat'
mian lokon, por de l' homoj
provizore kaŝi vin.
La anĝeloj en kaldronoj
povas kuŝi kun rezin';

beatuloj, apostoloj
kantu en drinkeja ĥor';
ĉar ja estas tia rolo
por sanktul' ne malhonor'.
Mi bedaŭras, ke pardonon
devas peti pro malvast',
ĉar pli grandan regionon
havis via sankta kast'.

Antaŭvidas mi momenton,
kiam homoj en finfin'
pelos ankaŭ nian genton
el varmega tera sin'.

Ligas nin la sama sorto;
do, kunvivo en afabl',
en malvast, sed konkordo,
la anĝelo kaj diabl'!

Tial estas la propono
al vi jena: en infer'
sidu apud mia trono!
Kaj subskribo: „Lucifer“.
Aŭdis mi, ke sankta Petro
diris tuj sen hipokrit':
„Nu, post tia hompenetro,
ĉu ni estu en hezit'?“

V. Ardes, Moskvo

HEROA IMPETO

Okaze de la 60-jara datreveno de la fondi-
ĝo de l' unua esperantista societo kaj la 40-jara
datreveno de la nuna societo en Plovdiv.

En jaroj unuaj de nia jarcento,
soifa pri mondo de amo kaj ver',
rondeto Plovdiva en frata konsento
flirtigis la flagon de l' granda esper'.

Aligis adeptoj, ekbolis laboro,
gazet' „Rondiranto“ ekluktis por cel';
per grupoj flamantaj „Devjatnin“, „Fervoro“,
„Kulturo“ — ekpórtis la flagon de l' Stel'.

Nek tempo malluma de l' sanga faŝismo,
nek baroj, minacoj, nek blanka teror'
sukcesis mortigi en ni l' optimismon,
ĉar gvidis nin saĝa Partio — motor'.

Al lukto popola — armita ribelo
sindone aliĝis la brava anar',
herooj pereis sen tim', sen ŝancelo
kaj gardis la dignon de l' vera bulgar'.

Nun floras la lando! En ĉiuj anguloj
konstruas la brava popolo sen lac'!
Ĝojbrilon ni vidas en ĉies okuloj
kaj firman decidon vivadi en pac'.

Ivan Bataklijev
Plovdiv, 1961



AL LA KURSEJO

Oka leciono

Hodiaŭ, je la 7-a horo, mi havas lecionon de Esperanto. Nun estas jam la 6-a kaj 50 minutoj. Al mi tute ne estus agrable veni malfrue al la kurso. Tial mi preskaŭ kuras tra la strato. La trotuaro svarmas pro homoj.

Subite — kies voĉon mi aŭdas voki mian nomon? Ho, la voĉo de Nikolao, mia bona amiko. Mi volus vidi lin kaj interŝanĝi kelkajn parolojn kun li, sed mi scias, ke, se li komencus paroli, nia interparolo ne ĉesos baldaŭ. Tial mi ne haltas. Sed jen ies mano kaptas min je la ŝultro de malantaŭe.

— Kien vi kuras tiel, diablo?

— Ho, Nikolao, saluton. Tamen — nun pardonu min. Mi devas rapidi, rapidegi...

— Tial do vi kuras kiel furioza ĉevalo! Depost kvin minutoj mi persekutas vin... Se vi estus birdo, vi ne povus flugi pli rapide. Kien do?

— En la gimnazion. Sed nun...

— Nu, bone. Mi akompanos vin iom. Kion vi povus serĉi vespere en la gimnazio?

— Tie estas vespera kurso de Esperanto. Mi vizitas ĝin. Mi timas, ke mi alvenos malfrue.

— Vi do lernas Esperanton? Ĉu vi havus ion kontraŭ, se mi akompanus vin en la kursejon? Kial vi lernas tiun lingvon?

— Por scii kaj uzi ĝin. Por ligi min kun homoj de ĉiuj nacioj. Sed tio estas pli vasta kaj profunda demando. Mi ne povus klarigi nun al vi ĉion...

— Ha, jen kontraŭ ni venas Marko...

Efektive nia komuna amiko Marko marŝas sur la trotuaro. Li rimarkas nin de malproksime. Li direktas sin al ni.

— Saluton! Kien? (Marko ordinare estas lakona en sia parolo).

Respondas Nikolao:

— Antono iras en la gimnazion al vespera kurso de Esperanto. Mi akompanas lin. Ĉu vi ankaŭ ne venus kun ni?

— Volonte, se oni permesus al ni ĉeesti.

Mi diris:

— Mi kredas, ke la instruisto konsentus pri via ĉeesto. Venu do! Vi mem konstatos senpere kiom facila lingvo estas Esperanto kaj kiajn sukcesojn mi atingis en daŭro nur de du monatoj...

Kaj nia triopo rapide marŝas al la kursejo.

Proverboj. — Se okulo ne vidus, koro ne avidus.
Ne ĵetu ŝtonon en maldensan koton.

VERBO

Kondiĉa modo: -US.

Ĉu vi deziras veni kun mi morgaŭ al la monto? — Mi venos, se mi povos. (*Esprimo de probableco kaj intenco veni*). Mi venus, se mi povus. (*Esprimo de dubo eĉ de preskaŭa konvinko, ke la veno estas neebla*).

Se vi havas (nun) monon, pagu ankaŭ mian kotizon. — Se mi havus, mi pagus (sed bedaŭrinde mi ne havas monon, do mi ne povas pagi).

Se hieraŭ mi havis (estus havinta) monon, mi pagus (mi estus paginta) mian kotizon kaj ankaŭ la vian.

Se morgaŭ mi havos monon, mi pagos ambaŭ (la du) kotizojn.

Estus bone, se vi pagus (pagos) hodiaŭ.

Se mi hieraŭ sciis (estus sciinta) tiujn faktojn, hodiaŭ mi ne venus ĉi tien.

Kion vi faros, se vi gajnos la grandan premion de la loterio? — Kion vi farus, se vi gajnus la grandan premion de la loterio?

Kia plezuro estus por mi akcepti vin kiel gaston! (*Esprimo de deziro, ke tio okazu*).

Ho, se junulo sciis kaj se maljunulo povus! (*Esprimo de bedaŭro, ke tio ne estas tiel*).

Nebona esprimo: Se oni rigardis tra la fenestro, oni vidis la arbaron — anstataŭ: Se oni rigardus (en ĉiu ajn momento) tra la fenestro, oni vidus la arbaron.



PREPOZICIOJ.

Kombinitaj prepozicioj:

Mi prenas la kajeron *el* sub la benko. De la piedoj *ĝis super* la kapo. *De sur* la monto.
De post. Vino *de* antaŭ dek jaroj.

AKUZATIVO

Al-en la ĉambro = en la ĉambron.

Al sur la monto = sur la monton.

Kie vi estas? — Mi estas en la lernejo.

Kien (al kie) vi iras? — Mi iras en la lernejon (al en la lernejo).

Supre estas alta arbo. Mi iros supren por vidi tiun arbon.

Antaŭ ĉiuj marŝas Petro. Li marŝas antaŭe. Iru antaŭen (al antaŭe), atingu Petron kaj antaŭiru lin!

Dekstre estas fenestro. Iru dekstren (al dekstre) kaj malfermu la fenestron.

(*En la supraj ekzemploj la akuzativo post prepozicio esprimas movon al loko kaj la punkton, kiun celas la movo: AL — direkto, EN — la loko, la punkto, al kiu celas la movo.*

Memoru: post la prepozicioj AL kaj ĜIS oni neniam uzas akuzativon, ĉar ili sufiĉe montras la almovon per si mem).

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ.

JE — ĝenerala prepozicio sen difinita signifo, kiun oni uzas en kazoj, kiam neniu alia prepozicio esprimas taŭge kaj ĝuste la penson.

Ĉeesti = esti ĉe, esti en certa loko aŭ inter certaj homoj. Ĉeesti koncerton. Ĉeesti kunvenon. Via ĉeesto estas necesa.

Senpere = rekte (sen-per-e), sen io aŭ iu intermetita.

Mi aŭdas la voĉon de Petro voki min. (*Ĉi tie la infinitivo rilatas al la komplemento kaj havas ĝian gramatikan personon*).

Li invitis min viziti lian hejmon. Mi konsilas vin aĉeti tiun ĉi libron. Mi instigos lin paroli. Diru al li rapidi. Li vidis ŝin stari antaŭ la pordo.

EKZERCOJ

1. Se ili labor. . . . pli bone, ili ricev. . . . pli grandan pagon por sia laboro.
Li ankaŭ pov. . . . aĉeti pomojn, se li hav. . . . monon.
Mi sent. . . . min feliĉa, se mi hav. . . . vian senzorgan karakteron.
Ne pensu plu pri la malbono, kiun li kaŭzis al vi! — Ho, se mi pov. . . . ne pensi pri tio!
2. Dimanĉe mi iros sur la mont. . . .
Mi esperas trovi ankaŭ vin sur la mont. . . .
Venu ti. . . . ĉi!
En ki. . . . urb. . . . veturos Marko?
En ki. . . . urb. . . . loĝas via frato?
Ili direktis sin supr. . . . al la alta loko.
Lasu la libron sur la tabl. . . . !
Ĉu vi iros en la teatr. . . . ?
Ĉu vi jam estis en la teatr. . . . ?
Li metis la horloĝon en si. . . . poŝ. . . .
3. Ĉu vi aŭdis lin kant. . . . ?
Ni surprizis ilin prepar. . . . siajn valizojn por forveturo.
Al mi estas agrable vidi. . . .
mangi. . . .
veturi al. . . .
ricevi. . . .

La amasa partopreno de la esperanistoj en la solvo de la ekonomiaj taskoj de nia popolo suprenigas la aŭtoritaton de nia movado.

GAJNINTOJ EN LA ORGANIZA KONKURADO 1961—62

En la n-ro unua 1961 de BE CK de BEA deklaris la kondiĉojn de organiza konkurado 1961—62, kies fino koincidas kun la XXXV kongreso en Burgas. Tie estos oficiale anoncitaj la rezultoj kaj disdonitaj la premioj. La konkurado vekis grandan intereson kaj instigis la societojn al vigla kaj laŭplana agado.

La konkurado konsistis el tri etapoj. La finaj rezultoj, publikigitaj ĉi-sube en la kvara kolono, prezentas la mezan procentan plenumon de la planoj en tiuj tri etapoj. Ni memorigas ke la planoj de 1962 estas per 10% pli altaj ol la pasintjaraj.

La fina templimo de la konkurado estis la 10-a de majo 1962 kaj ni kalkulas nur la membrojn kaj abonintojn ĝis tiu ĉi dato.

Kiel estas videble de la tabelo la unuan premion — la transiran flagon de CK de BEA kaj bibliotekon por 30 levoj, ricevas la societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora.

Societo „Flamo“ en la kemia uzino de Dimitrovgrad inde ricevas la duan premion — bibliotekon por 25 levoj.

Societo „Progreso“ en vilaĝo Polski Trâmbeŝ konservis sian pozicion de la antaŭa konkurado kaj denove ricevas la trian premion — bibliotekon por 20 lv. Ni precipe atentigas pri la nombro de ties abonintoj — 66! Gratulante ĝin pri tiu modela agado en la varbado de abonintoj, ni apelacias al la ceteraj societoj — vilaĝaj kaj urbaj — trastudi kaj postseki la ekzemplon de progresanoj.

La ceteraj societoj ricevos honordiplomon pro modela laboro.

Ni gratulas ĉiujn ĉi societojn!

N ^o laŭ grado de plenumo	Loko kaj nomo de la societo	1962			meza plenumo de la planoj 1961/62 en %
		membroj	abonintoj	plenumo de la planoj en %	
1	Stara Zagora — „Verda Stelo“	181	101	283,7	226,5
2	Dimitrovgrad — „Flamo“ (fabrika)	90	71	210	199,5
3	vil. Polski Trâmbeŝ — „Progreso“	30	66	167,7	146,6
4	Vraca — „Sukceso“	135	65	176,3	136,9
5	Jambol — „M. Gorkij“	186	69	245,8	135
6	Stanke Dimitrov — „Marek“	81	59	145,1	127,4
7	Tolbuhin — „Paco“	55	34	125	124
8	Ruse — „Ponto de l'Amikeco	53	25	138,6	109,8
9	Pernik — „Nova Vojo“	40	42	156,1	107
10	Burgas — „Nigra Maro“	—	59	41,6	105,1
11	Sevlievo — „Fratiga Stelo“	55	31	103,1	102,6
12	Samokov — „Rila Esperantisto“	—	32	72,7	102,6
13	Sofio — „Vela Peeva“ (studenta)	60	18	131,8	100,1

Organiza fako de CK de BEA



BULGARA ESPERANTISTA JUNULARO ANTAŬ LA 35-a KONGRESO DE BEA

La esperantista junularo en nia lando mar-
kita dum la pasintaj du jaroj pliajn paŝojn an-
taŭen al pli amasa kaj pli organizita junulara
movado, al plia perfektigo kaj pli sencoplena
vivo de la esperantistaj junularaj grupoj.

En multaj lokoj la junuloj daŭre aktivis,
ekz.: Ruse, Plovdiv, Burgas ktp. Novaj freŝaj
fortoj aliĝis al la movado, kreis, plivigligis aŭ
stabiligis la grupojn, ekz. Kubrat, Varna, Vra-
ca, Tolbuhin. Tutaj societoj ekz. en Jambol,
Mihajlovgrad k. a., konsistas plejparte el junu-
loj. Aliloke la junulara esperantista movado
jen kreskas, jen stagnas. Kiam du-tri fervoru-
loj sukcesas gvidi kaj organizi la laboron oni
rikoltas sukcesojn. La malapero tamen de iu
loka aktivulo ofte influas katastrofe al la tuta
grupo. Tiu fakto nur substrekas la gravecon
de la junulara aktivularo, pri kies kresko ĉiu
societo devas zorgi konstante.

La du naciaj junularaj baloj en Plovdiv
kaj Ruse grave kontribuis por plivigligo de
la junularo, por kreo de novaj kontaktoj kaj
variigis la vivon de la grupoj. Ĝenerale tut-
landaj aranĝoj havas grandan sukceson, rilate
la amasa partopreno, ili tamen elmontras klare
unu grava manko — nekontenta lingva per-
fekteco. Precipe lige kun la antaŭstarantaj in-
ternaciaj kongresoj en nia lando, tiu perfek-
teco devas estiĝi unu el niaj ĉiutagaj zorgoj.

Konstantaj ligoj kun la Komsomolo kaj la ce-
teraj organizaĵoj nur favoras nian agadon kaj
helpas por la ĉiam larĝa socia rekonno de nia
movado. Kiel ekzemplo oni povas mencii la
grupon en Kubrat, kies prezidanto mem estas
membro de la Urba Komsomola Komitato. Same
bone agas tiurilate ankaŭ la junuloj el St. Za-
gora, Varna, Kolarovgrad, Pazargik ktp.

La ekzemploj de la Teksa lernejo en
Vraca, kie tuta klaso studas Esperanton en
sia regula programo, de la gimnazio en Polski

Trâmbeŝ, de lernejoj en Gabrovo, Sofio kaj
aliloke, klare montras la rolon, kiun povas lu-
di la instruistoj por disvastigo de la lingvo.
Sendube, aktivaj instruistoj — jen estas la
plej efika kaj natura vojo al enpenetro inter
la lernantoj, al amasa morgaŭa esperantista
movado.

Kreskas konstante la internaciaj kontaktoj
de la bulgara junularo. Vigla estas la kores-
pondado. Dum la pasinta jaro kelkaj dekoj da
junuloj vizitis aliajn landojn, kongresojn kaj
renkontiĝojn. Ĉi-jare ni denove preparas eks-
kurson al Pollando.

Dum la kongreso en Burgas, unu tuta duon-
tago fakte estos dediĉita al la junularo. La
trian kongresan tagon (16.07) je la 15.00 h.
okazos la JUNULARA KUNVENO, kiu estas
laborkunsido, pridiskutanta la agadon de la Junu-
lara Sekcio de BEA kaj de la junularaj grup-
poj. Ĉiuj, kaj precipe la gvidantoj de la lokaj
grupoj devas serioze prepari sin por koncize
raporti pri siaj ĉefaj atingoj kaj ĝenerale
diskuti pri la problemoj de la junulara mo-
vado.

La saman tagon, vespere, tre verŝajne en la
salono de la kabloprodukta uzino „V. Kolarov“
okazos la JUNULARA VESPERO — balo. Por
ĝia arta kaj distra programo proponoj kaj kon-
tribuoj estas bonvene akceptataj.

La belarta vespero, kiu okazos la duan kon-
gresan tagon same estas larĝe malfermita por
la junuloj, amatoraj artistoj kaj por la kant-
kaj dancgrupoj junularaj. Konkretajn propo-
nojn bonvolu direkti al la LKK, Burgas, p. k.
138.

Ĝis revido en la 35-a Kongreso de la Bul-
garaj Esperantistoj.

S. Simeonov

prezidanto de la Junulara
Sekcio de BEA

ORGANIZA VIVO

STARA ZAGORA. En la lastaj 2—3 jaroj
la Esperanto-movado en St. Zagora rapide kre-
skas. Dank'al la klopodoj de la estraro por
sukcesa fino de la kursoj, por varbado de la
kursanoj kiel membroj kaj por altiro al la so-
cieto de la malnovaj esperantistoj, kiuj provi-
zore malproksimiĝis de la movado, la societo
kvarobligis sian membraron kaj preskaŭ atin-
gis la ciferon de 200 membroj.

Dum la kuranta 1962 j. membras en la so-

cieto tiaj eminentaj sociagantoj, kiel la sekre-
tario de la Distrikta Komitato de BKP — Min-
ĉo Ivanov, la prezidanto de la Distrikta Konsi-
lantaro — Ĥr. Kelĉev, la distrikta juĝisto —
Dragija Dragiev, direktoroj de lernejoj kiel
L. Mironova (membro de la estraro), kuracistoj
D-ro P. Rahnev (membro de la estraro), D-roj
Enev, Kisjova, Spiridonov k. a., ing. Dimov —
ĉefingenieroj de la kemia sterka uzino, direk-
toroj de entreprenoj kaj multaj aliaj. Tiuj naj
membroj kontribuas por pligrandigo de la aŭ-
toritato de nia societo.

ing D Dobrev



VRACA. Alproksimiĝas la Unua de Majo-festo de la laboruloj en la tuta mondo. Ĉie regas ĝoja atmosfero. Kun ĝojo atendas la feston ankaŭ la esperantistoj el Vraca. Kiel ĉiujare ili denove partoprenos la manifestacion, sed nun ili ankaŭ devas montri sin pretaj inde renkonti la 19-an Internacian Junularan Kongreson okazonta en la urbo, venontsomere.

Vigla preparo komenciĝis. La domo de la prezidanto de la junulara grupo — Enjo Daskalov, transformiĝis en la malgranda laborejo. Oni skribis sloganojn, oni kudris paperajn juĝojn por knabinoj, V. Borisov pentris afiŝojn.

Jen fine la atendita tago. Frue vekigas la urbo. Tie kaj tie en la stratoj sonis solena muziko. Kolektiĝis ankaŭ la esperantistoj, 150 gejunuloj, lernantoj kaj malnovaj veteranoj. Formiĝis la kolumno. Ĉefrunte Bojĉo Mladenov portas la grandan verdan standardon. Kelkaj lernantoj portas surskribon „ESPERANTO“. Sekvas grandega afiŝo, reprezentanta junulojn en la tri rasoj kun surskribo: „Ĉu vi prepariĝas por la 19-a Internacia junulara kongreso en Vraca“. La knabinoj el la kantgrupo estas vestitaj kun blankaj bluzoj kaj verdaj juĝoj, ili kantis la himnon de la junularo kaj esperantajn kantojn. Super la kapoj de la lernantoj flitis la standardoj de ĉiuj landoj.

Granda estis la entuziasmo de la publiko. Ĉe la apero de la multkolora esperantista grupo antaŭ la oficiala tribunalo, la parolanto de la urba radio anoncis: „La esperantistoj en Vraca en firmaj vicoj manifestas sian pretecon labori por la proksimiĝo de ĉiuj popoloj, por paco kaj amikeco...“

Kostadin Ivanov, lernanto

VRACA. La esperantistoj en Vraca ĝojas ke en nia urbo dum 1963 okazos la 19-a Internacia Junulara Kongreso. Por la sukcesa organizo de la kongreso antaŭ ni staras multaj gravaj taskoj, inter kiuj ankaŭ la plia lingva perfekteĝo. La societo „Sukceso“ organizis kurson por progresintoj, kies unua leciono jam okazis sub la gvidado de k-do R. Tričkov. La kurso daŭros ĝis venonta somero, ĉiuvendrede. Intertempe la plej spertaj transprenos la gvidadon de kursoj por komencantoj dum la venonta lernoĵaro.

E. Daskalov

JAMBOL. Por la esperantistoj el Jambol la 30-a de aprilo estis vigla, rimarkinda tago. Frue matene grupo da esperantistoj el la urbo renkontiĝis je la stacidomo kun k-do Georgi Dimov-prezidanto de la Esp. societo en Varna kaj interparolis kun li pri la antaŭstarantaj taskoj. Spertintersaĝo starante!

Antaŭtagmeze unu ĉefa strato, apuda al la centra urba placo, estis nomigita „Esperanto“. La ceremonion partoprenis ankaŭ k-do M. Bojaĝiev — vicprezidanto de la Urba Konsilantaro.

Okaze de la antaŭstaranta 35-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, la junuloj aranĝis propagandan vtriron en la centro de la urbo. Aktiva kaj fruktodona tago!

Pavel Janev

JAMBOL. La 1-an de Majo. La tago vekigas post freŝiganta printempa pluvo. La urbo estas dronanta en verdeco, floroj kaj standardoj. En la ĉielo flugas kolomboj. Je la 10-a h. komenciĝis la manifestacio de la laboruloj el Jambol. Post la lernanta junularo sekvas la vicoj de la gelaboristoj el la uzinoj, kulturaj organizaĵoj. En tiu maro da homoj trovis sian lokon ankaŭ la geesperantistoj el la urbo. Kiam ni preterpasis la tribunon kun la oficialaj personoj kaj skandis: „Vivu Esperanto“, „Vivu la paco kaj la amikeco inter la popoloj!“ la urba radio-servo anoncis: „La esperantistoj jambolanoj per sia korespondado diskonigas tra la tuta mondo la nomon de nia urbo kaj la sukcesojn de nia popolo en la konstruado de la socialismo en la distrikto kaj en la tuta lando“.

Dimo Trudoljubov

STANKE DIMITROV. Je la 18-a de aprilo j. k. Esperanto-societo „Marek“ aranĝis artan spektaklon en la salono de la urba teatro.

La horo estas 20. La kurteno de la scenejo malrapide leviĝas kaj sur la scenejo malkovrigas grupo da junaj akordionistoj. Sur ĉiu nottenilo pendas verda standardeto. En la fundo de la scenejo oni vidas grandan portreton de nia majstro Zamenhof kaj sub ĝi la societantan standardon. Super ĝi estas establita slogano „Per Esperanto por tutmonda paco“ en Esperanto kaj en bulgara lingvo.

La akordionan orkestron ĉefas nia samideano Zaharij Vitoŝanski. Li lerte gvidas ĝin. La publiko aŭdas la esperantistan himnon. La prezidanto de la societo Boris K. Drenski tralegis mallongan referaĵon pri la signifo de la internacia lingvo Esperanto. Sekvis akordiaj orkestraj kaj solaj melodioj kaj deklamaĵoj plenumitaj de geesperantistoj: Ivan Dobrovski, Miĥailo Nikolov, Vasilka Paŝeva, Nikola Petrov k. a.

La publiko entuziasme aklamis la partoprenintojn. Tiu koncerto prezentas grandan sukceson por nia societo.

Boris Miĥajlov

UNU GRAVA TASKO — PLENUMITA

Ĝis la pasinta jaro, nia societo „M. Gorkij“ en Jambol plene neglektis la demandojn pri disvolvado de la markoj-brikoj por Esperanto-domo. Tamen la nova estraro serioze okupiĝis pri tiu kampanjo kaj prizorgis ilian kompletan disvendon. Dum 1961 oni disvendis 2 280 markojn-brikojn kaj dum la kuranta jaro la ceterajn 2 520. Grandegan laboron plenumis k-do Dimo Trudoljubov — prezidanto de la societo, kiu sola sukcesis disvendi 4 570 markojn-brikojn. Kontribuis ankaŭ Ĉ. Pančev vendante 250 markojn, D. Hazmonaj — 86, D. Tărpanova — 53, St. Popov — 20 kaj St. Aleksiev, Iv. Dimitrov kaj St. Panajotova — po 7.

La esperantistoj el Jambol kun granda ĝojo deklaras, ke honore al la 35-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio plenumis unu sian gravan devon al la bulgara esperantista movado.

G. Jordanov



Unuamaja manifestacio en Vraca

**La duonjaraj abonintoj
devas renovigi sian abonon.
Tiu ĉi numero estas la lasta,
kiun ni sendas al ili.**

**Gekamaradoj, abonigadu
al „Bulgara Esperantisto“!**

MEMORE AL STOJO KALPAZANOV KAJ VELA PEEVA

La Esp.-societo en Velingrad organizis celebradon de Stojto Kalpazanov kaj Vela Peeva — esperantistoj-partizanoj heroe pereintaj en la montaro proksime de Velingrad, dum la printempo de 1944 j. Malgraŭ la malbona vetero, la solenajn partoprenis 70 gastojn el Pazarĝik, 40 — el Plovdiv, 12 — el Peŝtera, k-do A. Grigorov el Sofio k. a. En la montaro, sur la kalvario de la pafmortigitaj partizanoj estis metitaj kaj solene inaŭguritaj marmoraj memortabuloj kun esperanta teksto, ĉizitaj de frato Ivan kaj Sotir Vasilevi el Pazarĝik. Dum la modesta ceremonio, pri la herooj parolis k-do Krum Ginčev — estinta partizano, Godev — prezidanto de Esperanto-societo en Velingrad kaj Manol Ĉolev — sekretario de la sama societo, portanta la nomon de Stojto Kalpazanov.

R. Georgieva

TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „Narodno delo“ (Varna) de 13. II. 1962 en la kroniko aperis sciigo pri kunveno de la esperantista societo „Albatro“ kun prelego de Paskal Bogoslovov — „La balotoj kaj la batalo por paco“.

En la sama ĵurnalo de 2. III. 1962 — sciigo en la kroniko pri malfermata kurso por komencantoj en IV Politeknika Gimnazio.

En la sama ĵurnalo de 27. III. 1962 — granda artikolo de Georgi Dimov — „Esperanto — batalilo por paco kaj amikeco inter la popoloj“ (okaze de la 75-a datreveno de la kreo de Esperanto).

En ĵurnalo „Transportna Iskra“ de 20. I. 1962 — artikolo de Milčo Vărbanov — „Ni dankas al vi, hungaraj kamaradoj“ pri la ekskurso en Budapeŝto.

En la sama ĵurnalo de 17. II. — sciigo pri la III Gejunulara Esperantista Balo en Ruse.

En la sama ĵurnalo de 8. III. — artikolo de Milčo Vărbanov „Esperanto — ŝlosilo al la mondo“.

En ĵurnalo „Dunavska Pravda“ (Ruse) de 7. IV. — artikolo de J. Dimitrov „Estu bonvenintaj, junaj entuziasmaj gastoj“ — pri la III Tutlanda Esperantista Gejunulara Balo en Ruse.

En la sama ĵurnalo de 15. IV. — informo „La Universala Esperantista Kongreso en Bulgario“.

En ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ (Plovdiv) de 25. IV. — informo pri la kunveno de la esperantista societo kun prelego de Georgi Dimov el Varna pri la antaŭstaranta universala kongreso en Kopenhago.

En ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (Sofio) de 4. IV. en la rubriko de ĉiutagaj sciigoj — sciigo pri la III tutlanda balo de la ĝejnuloj-esperantistoj en Ruse.

TRA LA MONDO

Elektio en UEA

Laŭ la statuto de UEA, okazas ĉi-jare la reelektio de la Komitato. La aliĝintaj landaj Esp.-Asocioj devas elekti siajn reprezentantojn (komitatanoj A) proporcie al la membronombro. La delegitoj de UEA elektos laŭ la sama principo la komitatanojn B. La tuta Komitato rajtas alekti limigitan nombron da komitatanoj C.

La novelektita Komitato devos siavice elekti en Kopenhaga kunsido novan Estraron kaj Prezidanton de UEA. La elektoj de UEA okazas ĉiun trian jaron.

La komitatanoj A de Bulgara Esperantista Asocio estas Asen Grigorov, Atanas Lakov, Violin Oljanov kaj Radoslav Triĉkov.

Dua laborplano de UEA

Antaŭ nelonge UEA aperigis la projekton de nova laborplano konsistanta el 28 paragrafoj.

La projekto koncernas la agadon por esperanto de UEA, landaj Esperanto-asocioj kaj lokaj societoj en la venontaj jaroj. La plano estos submetita al la nova Komitato de UEA por akcepto dum la kunsido en Kopenhago.

La esperantistoj en Sofio diskutis la projekto-planon de UEA. La estraro de la societo „M. Gorkij“ estis komisiita de la kunveno sciigi al UEA siajn proponojn kaj kompletojn.

Nova sidejo de UEA

En la komenco de la kuranta jaro UEA aĉetis propran domon en la strato Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo 2, Nederlando. Tie jam translokiĝis kaj funkcias la Centra Oficejo de UEA.

Radio Prago disaŭdigas en Esperanto

Post longdaŭra klopodo de la ĉeĥoslovakiaj esperantistoj starigis regula kunlaboro inter la Radio Prago kaj la Ĉeĥoslovakia Esperanto-Komitato. Aŭskultu la disaŭdigojn ĉiun lastan ĵaŭdon de la monato inter 18,45 kaj 19,00 h (MET), sur la meza ondo 233,3 m. (1,286 KHz)

En la sama ĵurnalo de 30. IV. en la sama rubriko — sciigo pri la 35-a Kongreso de la Bulgara Esperantistoj en Burgas (14—16. VII. 1962).

En revuo „Kinoljubitel“ (Sofio), n-ro 2/1962 — artikolo de Donco Hitrov „Unua festivalo de kino—kaj fotoamatoroj-esperantistoj“ de la apuddanubaj landoj.

Ekspozicio en Ĉinio

Por veki pli grandan intereson pri Esperanto kaj akiri pli vastan aplikadon de nia lingvo en Ĉinio, la Ĉina Esperanto-Ligo aranĝos imponan E-ekspozicion en decembro de la kuranta jaro. Krom diversaj novaj esperantaĵoj ĝi bezonas precipe materialojn pri utiligado, cirkulado de „El Popola Ĉinio“ kaj aliaj ĝiaj eldonaĵoj. Dezirataj estas gazetoj kaj ĵurnaloj sur kiuj aperis tradukoj, represoj el „El Popola Ĉinio“ kaj aliaj eldonaĵoj de ĈEL, fotoj montrantaj legadon, ekspozicion aŭ prelegon pri aŭ laŭ materialoj de la supre diritaj gazetoj kaj libroj, kaj eĉ simplaj informoj pri tiaj utiligado kaj cirkulado. Ĉiujn materialojn por la ekspozicio oni sendu antaŭ la fino de septembro al la redakcio de „El Popola Ĉinio“ (P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio), kaj notu sur la koverto „Por Ekspozicio“. Rekompenso la sendintoj ricevos belan memoraĵon de la ekspozicio.

Ĉiuj ja scias, ke sukceso de Esperanto en la Oriento multe signifas por triumfo de E-movado. Do helpu aktive al la fruktodona okazigo de tiu ĉi ekspozicio.

Sciencista konferenco

En aŭgusto 1962 okazos internacia konferenco de la sciencistoj. La konferenco estos aranĝo de la esperantistoj-sciencistoj, sed ĝin partoprenos ankaŭ sciencistoj-neesperantistoj. La konferenco okazos samtempe kun la 47-a UK de Esperanto en Kopenhago kaj diskutos la problemon pri la internacia lingvo en la scienco. Pro kresko de la internacie uzataj naciaj lingvoj en la scienco la fakuloj estas embarasitaj sekvi la rezultojn de la fremdlandaj esploroj. Enkonduko de Esperanto en la sciencistajn mediojn estas sendube grava paŝo al plifortigo de la informiteco kaj kunlaboro inter la ĉiulandaj sciencistoj.



Laŭ la ĵus ricevita informo, la Plenuma Komitato de UNESKO decidis dum sia lasta sesio envicigi U. E. A. en kategorion de „Informado kaj Konsultaj Rilatoj“ (kategorio B) laŭ la novaj Direktivoj Koncerne la Rilatojn de UNESKO kun Internaciaj Neregistaraĵoj. La organizaĵoj de kategorio A (formitaj de UNESKO mem) kaj B (la plej gravaj privataj internaciaj organizaĵoj) ĝuas konsiderindajn avantaĝojn kompare kun la organizaĵoj de kategorio C (malpli gravaj internaciaj organizaĵoj en informaj rilatoj kun UNESKO) kaj la ceteraj organizaĵoj, ekster kiu ajn kategorio, kun kiuj UNESKO povas havi nur neformalajn rilatojn. La nova pozicio estas rezulto de efika kunlaborado de UEA kun UNESKO ekde 1954 kaj promesoplena por plua kunlaborado kaj por la fortikigo de la pozicioj de UEA en la mondo.

SOVET-UNIO

Esperanto-movado en Odeso iomete plivigliĝas: laboras la Centra Esperanto-Grupo en la Fervojista Palaco, infana Esperanto-rondeto en 72-a mezlernejo, estas organizata Esperanto-rondeto en la Navigacia Lernejo.

Ĵus atingis nin informo, ke la Dana Esperantista Eldonejo „KOKO“ baldaŭ aperigos „La Marvirineton“ de H. C. Andersen. La volumo aperos en julio 1962. La prezo estos 15 danaj kronoj aŭ 30 steloj.

AL LA KREINTO DE ESPERANTO

Via patro vin edukis por laboro en scienco, sen rimarki ke en via juna koro ĝermis greno krea de mirinda ilo — la tutmonda lingvo, kies hela brilo vekas sentojn amikecajn por la pac’.

Laŭ deziro patra vi diplomon prenis, sed la homdolorojn tiel vi komprenis, ke anim’ sentema via eksuferis pro bataloj gentaj, falso kaj malvero kaj pro l’ viv’ mizera sen aŭdac’.

Tial Esperanton kreis vi kun celo nobla kaj homama por ke tra l’ malhelo, lumon verŝu ĝi de amo kaj konkordo inter la popoloj de la Sud’ ĝis Nordo, kiel kosmonaŭt’ soveta tra la spac’.

Nikola Pilev, Varna

PAROLO DE LA REDAKCIO

Tiu ĉi n-ro estas la lasta, kiun ni sendas al la duonjaraj abonintoj. Ili devas tuj renovigi sian abonon, sendante 0,70 lv. al la asocia kancelario. La redakcio apelacias al ĉiuj societaj estraroj kaj unuopaj esperantistoj inviti la duonjarajn abonintojn pri tio kaj ankaŭ varbi novajn abonantojn. Ju pli da abonintoj ni havas, des pli forta estos nia asocio.

Dum julio BE ne aperos. Dum aŭgusto aperos duobla kajero 7—8 kun la kongresaj decidoj kaj aliaj interesaj materialoj.

Gekamaradoj, kunlaboru amase al nia ŝatata organo por variigi ĝian enhavon. Ĝi estu nia komuna produktaĵo!

En la Ministerio por internaciaj aferoj de iu okcidenta lando okazis ŝtelo. La ĉefministro telefone demandas:

— Ĉu estas ŝtelitaj gravaj dokumentoj?

— Bedaŭrinde jes! — la rezultoj de la balotoj.

— De kiuj balotoj?

— De la morgaŭaj.

* * *

Sprita hungara aktoro estis konata pro sia neakurateco. Lun tagon li malfruis pli ol duonon da horo por provo.

— Je via loko mi tute ne venus — riproĉis lin la teatra direktoro.

— Mi kredas — respondis la aktoro — ĉar vi havas nenian senton pri respondeco...

* * *

La ĉefredaktoro estas poeto. Li ne publikigas alies versojn en du kazoj: se la versoj estas malbonaj kaj se la versoj estas ... tre bonaj.

* * *

— Kian salajron mi havos?

— Sescent en la komenco, sekvos plialtigo ...

— En tia okazo mi venos post la plialtigo.

* * *

— Mia edzino malaperis — deklaris malfeliĉa edzo en la policejo.

— Ĉu vi povas priskribi ŝian eksteron, karakteron?

— Memkompreneble, tamen 'se vi promesos, ke en nenia okazo miaj paroloj atingos ŝiajn orelojn!

* * *

— Ĉu vi scias, Andreo, kio okazas al infanoj, kiuj trompas?

— Jes, mi scias: ili veturas senpage en la tramo.

* * *

— Nur mi povas kompetente paroli pri la koloroj — diris la daltonisto — ĉar mi estas ... indiferenta.

* * *

— Mi ne estas kulpas — diris la ŝoforo, kiu puŝis per sia aŭto homon sur la strato. Mi estas ŝoforo dudek du jarojn ...

— Mi estas ankoraŭ malpli kulpas — protestis la viktimo. Mi estas piediranto jam pli ol 65 jarojn.

* * *

Efika rimedo por silentigi iun estas la mielo. Ŝmiru la buŝon, kaj ĝi ekmutos ...

* * *

Drinkeja surskribo:

„Se vi trinkas por sinforĝeso, bonvolu, ni petas, pagi anticipe!“

*Kun sloganaj kaj kantoj antaŭen al nia XXXV
en B u r g a s!*

DEZIRAS KORESPONDI

POLLANDO

Filipczak Danuta, ul. Czarneckiego 35/7, Ostróda.

Zofia Woldanska, ul. Spodzielcza 3, Padianice — sola sinorino-instruistino dez. korespondi kun sinjoroj (40—60-jaraj).

USSR

N. Gusev, Moskovskaja 27, kv. 3, Novgorod — kun bulgarioj, rumanoj kaj hungaroj pri ĉt. interŝ. Pl.

A. Rimkus, Parkas 2, Plunge, Litovio.

Ni organizis E-kursojn, sed ni ne disponas pri adresoj de korespondemuloj. Niaj kursanoj dez. korespondi kun ĉl pri ĉt. Ili estas pretaj ankaŭ interŝ. Pl, gaz. k. a. laŭ interkonsento. Bonvolu turni vin al instruistoj, studentoj, junpioniroj, geknaboj de la 2-a ĝis la 7-a klasoj, kamparanoj el sovjetoj, anoj de fotamatora klubo, medicinistoj de polikliniko. Nia dreso: „Esperanto“, p/k 110, Gorjkij, 7.

Ševčugov N. D., Omsk-20, ul. K. Marksa 81, kv. 44 — kun ĉl., pri ĉt. — politikaj, literaturaj, muziko, stenografio.

VJETNAMIO

Chàh-Chiñh, 329 Hàñg Bòt, Hà-nôi — pri ĉt.

FINNLANDO

S-ro Lauri Tuominen, Pudasjärvi, Syöte, Metsälä.

S-ro J. A. Kiviluoto, Kajaani, Box 16

S-ino Ellen Raksila, Pudasjärvi, Syöte, Metsälän Koulu

BULGARIO

Conjo Ganey Minkov (instruisto, 40-jara), Kozloduj, Vračanski okr.

Petko Ničev, str. Patriarh Evtimij 67, Sofio — kun ĉl pri ĉt.

ĈINIO

Zhang Nai-Lun, Foreign Language Dept., Teachers' training College, Inner Mongolia, Huhehote — kun ĉl pri ĉt, precipe pri PM, arto.

GERMANIO

S-ino Ursula Schumann (24-jara), Ledenweg 49, Radebeul — kun ĉl per Pl.

F-ino Gudrun Krenz (21-jara), Seweningstr. 1, Radebeul — kun ĉl per Pl.

S-ro Jochen Gräfe, (18-jara), Heinrich Zill Str. 6, Radebeul — kun ĉl per Pl, interŝ. PM.

INDONEZIO

Jan Liep Poen, Djl. Boldy 45, Malang — volas ricevi plenan „Lernolibro de Esperanto“ (nur en Esperanto).

JAPANIO

Masahito Kaneko (studento), 110 Hakusan-goten-mati, Bunkio-ku, Tokio — interŝ. librojn kaj gaz.

Abonu al

„INTERNACIA ĴURNALISTO“

organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio!
Sendu tuj 1 levon al BEA, p. κ. 66, Sofio! Abonigu
vian amikojn kaj korespondantojn!

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktore), Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Delka Ĉolakova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01

G a z e t o

„BULGARA ESPERANTISTO“

estas la plej bona amiko

de ĉiu esperantisto —

nova kaj malnova

en nia lando.

De ĝi ĉiu ekscias pri la:

vivo de la societoj

decidoj de la Centra Komitato

movado eksterlanda

decidoj kaj aranĝoj de UEA

propagando en niaj ĵurnaloj kaj gazetoj

aperintaj Esperanto-libroj

historio de la Esperanto-movado.

En „Bulgara Esperantisto“ ĉiu trovos por si agrablan legaĵon kiu kondukas al rapida lingva perfektigo.

Estas akceptataj abonoj por la dua duonjaro. Abonpago — 0,70 lv.

Novaj abonantoj por la tuta jaro ricevos ĉiujn aperintajn numerojn!